



# Eventoj

Redakcia adreso:  
Budapest, pk. 87.  
H-1675, Hungario  
Telefono kaj telefakso:  
(+36-1) 1288-258

Internacia Sendependa Revuo pri la Esperanto-Movado

Julio (2) - '92

## Kio pri la UK?

Ĉi jare la UK estas organizata el la Centra Oficejo de UEA, el Rotterdam. La viena teamo nomiĝas ne LKK, sed LAK (=Loka Asista Komitato)...

Fine de majo al la Universala Kongreso aliĝis 2500 esperantistoj. (Por kompari: en 1924 estis 3400, en 1936 estis 854, kaj en 1970 estis 1987 partoprenintoj). La preparlaboroj pasas kontentige.

### "Miaj gepatroj estis esperantistoj"

La Alta Protektanto de UK estas d-ro Heinz Fischer, la prezidanto de la Aŭstria Parlamento. Jen parto de lia letero al la Loka Asista Komitato:

...Mi ĉiam tre admiris la ideon de la popolinterliga lingvo esperanto, jam eksciinte pri ĝi kiel infano, ĉar kaj mia patro kaj mia patrino estis entuziasmaj esperantistoj. Rimarkinda pri esperanto estas ne nur la genia lingvokreaĵo kaj la lingvistika atingo, sed ankaŭ la humanisma kaj popolintegrita ideo de la lingvo, ĉar ĝi baziĝas sur la prava supozo, ke homoj emaj paroli unu kun la alia ankaŭ kapablas solvi problemojn pli bone. Tial do komuna lingvo, enhavanta elementojn de gravaj kulturlingvoj, signifas grandiozan progreson kaj nun, kiel antaŭe estas dezirinde ke tiu ideo venku kaj ĝi gajnu novajn adeptojn, kaj ne nur memoriĝu kuntekste de la historio de la laborista movado, sed estu konsiderata kiel koncepto por la 21a jarcento...

D-ro Heinz Fischer

### Programeca parolado de Franz Jonas

La Honora Patrona Komitato havas plurnajn personojn kun vasta reputacio, kiel ekz. la aŭstria federacia ministro pri eksteraj aferoj, d-ro Alois Mock (!), kaj la intendantino de la Eksterlanda Sekcio de Aŭstria Brodkasto prof. Paul Lendvai.

En la bonveniga salutmesaĝo la urbestro de Vieno d-ro Helmut Zilk emfazas, ke:

...Vieno havas fortajn ligojn kun la historio de la internacia lingvo esperanto... En 1924 la unuan fojon gastis la UK en Vieno, kaj tiu kiu nun okazas, estas jam la kvara de tiaj amasaj aranĝoj en la federacia ĉefurbo de Aŭstrio. Vieno estis certe en la internilita periodo la centro de la laborista esperanto-movado, kies ano estis la posta viena urbestro Franz Jonas. Kiel historia evento de la movado intertempe estas rigardata la fakto, ke li en la jaro 1970 malfermis la 55-an Universalan Kongreson de Esperanto per programeca parolado!...

Laŭ la elsendo de Radio Vieno

Originala, necenzurita versio

## La danĝera lingvo en demokratiaj landoj

En artikolo prikomentita la libron *La danĝera lingvo* de Ulrich Lins (1), ukrainino Olga Kerzjuk priploras la fiagadon de esperantistoj, kiuj insultas, kalumnias kaj denuncas aliajn esperantistojn, kaj ŝi demandas: *Ĉu la celo pravigas la rimedojn? Ĉu por savi organizitan movadon ni pretas ĵeti en la faŭkon de totalisma ŝtato niajn samideanojn?* Kerzjuk, same kiel Lins, pritraktas persekutadon kontraŭ esperantistoj en reakciaj kaj totalismaj landoj en Eŭropo kaj Azio. Tamen, ni ne forgesu, ke simila agado, malpli grandskale, okazis ankaŭ en lokoj, kie la registaroj nomas sin demokratiaj.

Esperable en la estonteco iu movadhistoriisto verkos libron pri tiu aspekto de la persekutado de esperantistoj. Verŝajne la plej bone kvalifikita persono por plenumi tiun taskon estus Ivo Lapenna, kiu mem fariĝis viktimo de denuncoj (2) sed li jam mortis, do alia kompetentulo devos entrepreni la esploron.

Grava ĉapitro en tiu historio estos priskribo de eventoj en la usona provinco de Esperantujo en la jardeko post la dua mondmilito, kiam regis en la interna politiko la makartiismo. La tiutempa ĉefmotoro de la agado kontraŭ komunisma influo en la esperanto movado estis G.A. Connor, la ĝenerala sekretario de Esperanto-Asocio de Norda Ameriko (EANA), kiu en 1956 estis eksigita el UEA. Poste EANA mem eksigis Connor kaj kelkaj aliaj membroj de EANA en la 1950-aj jaroj organizis kampanjon de kalumniado kaj denuncado, kiu ne limiĝis al Usono, sed atingis la sekretan

policon de aliaj landoj.

Tiutempe mi frekventis kunvenojn de la novjorka esperanto-klubo kaj aŭdis el la buŝoj de la denuncitoj la malkuraĝigajn faktojn pri atakoj kontraŭ esperantistoj fare de aliaj esperantistoj. Ekzemple, la mondfama aktivulo de SAT, Ralph Bonesper el Hungario, ne estante usona civitano, estis minacata de deportado pro la denunco kontraŭ li, kiun la registaro ricevis de Connor.

Connor jam mortis, sed povas esti, ke li postlasis dokumentojn, kiuj havas historian valoron. Eble usonaj esperantistoj en la ŝtato Oregono povas informiĝi pri tio. Laŭ *Esperanto en Perspektivo* (3) abunda dokumenta ma-

terialo pri la kampanjo de Connor troviĝas en la arkivo de CED kaj en la protokoloj kaj aliaj dokumentoj de UEA por tiu periodo. La komploto estas karakterizita kiel "aparte ŝoka, ĉar ĝi estis organizita de grupo de da personoj en la kadro mem de UEA".

Mi ne scias, kiom da partoprenintoj ankoraŭ vivas, kiuj povas, en tiu ĉi periodo de glasnost, malkaŝi la verdajn krimojn de la pasinteco. Plej probable posedas dokumentojn ankaŭ d-ro Solzbacher, nuntempe loĝanta en la ŝtato Havajo.


Notoj

(1). Olga KERZJUK. *Pri ni mem, sen iluzioj: Leciono de "La danĝera lingvo"*. Esperanto. 1990. junio, p. 109-111.

(2). Ivo LAPENNA *Hamburgo en Retroperspektivo*. Saarbrücken, 1975, p.9 k. sekv.

(3). *Esperanto en Perspektivo*. Londono, Rotterdam, 1974, p. 179, piednoto 4.

Bernard Golden, Hungario



## Kaj kongreso ĉu okazos iam?

La nocion "kongreso" diversaj leksikonoj, vortaroj difinas preskaŭ sammaniere.

...kunveno de samcelanoj... por diskuti komunajn literaturajn, sciencajn, politikajn... demandojn" (laŭ PIV).

...diskuto de invitataj partoprenantoj (reprezentantoj) pri tre gravaj (komunaj) demandoj. En multaj medioj ĝi estas la legfara forumo. (laŭ Magyar Értelmező Szótár, hungara-hungara klariga vortaro).

ga vortaro).

En Esperantio la signifo de kongreso iom modifiĝis, ja tion vorton uzas la landaj, la internaciaj, kaj la fakaj asocioj por signifi ilian simplan jarkunvenon. Ankaŭ la UK de UEA kaj SAT-kongreso okazas ĉiujare. Sed ĉu ili vere estas kongresoj?

Estas multege da demandoj de nia esperanto-komunumo, kiuj bezonas komunan pritraktadon. La baza demando: kiuj ni estas esperantistoj, la celoj, analizado de la aktuala situacio, difino de prioritatoj, strategio kaj taktikoj, (daŭriĝo sur paĝo 7.)

*Kiuj ni estas esperantistoj?*

## Esperanto-popolo: ĉu subkulturo, etno aŭ ĉu nacieco?

Plej unue ni fiksu, ke homojn, kiuj finis iun e-kurson kaj parolas la lingvon, en tiu ĉi artikolo mi nomas: *esperanto-parolanto*, kaj tiujn e-parolantojn, kiuj konas la historion, strukturon, kulturon, kutimojn kaj akceptas la valor sistemon de nia movado, mi nomas *esperantisto*, kaj la tuton de *tiuj esperantistoj* - *esperanto-komunumo*.

### Ne kreskas la membraro

Preskaŭ en ĉiuj niaj kursoj la studentoj konatiĝas kun la lingvaj elementoj, en la plej bona kazo ili aŭdas ion pri la movadaj servoj, ĉefe kiel varbaj argumentoj, iloj de reklamo, aŭ celo de la studado. (Plejparto de kursgvidantoj konas mem nur tre surface nian movadon.) **Ĉiujare plurmiloj (!) da homoj finas la kursojn, sed en praktiko kreskas nek la membraro de E-Asocioj, nek la "konsumentoj" de diversaj servoj.** Ŝajne la nuna strukturo de nia movado permesas evolui nur ĝis tiu nivelo, kie ni troviĝas jam plurajn jardekojn.

Preskaŭ ĉiuj kursfinintoj provas iel-tiel kroĉiĝi al la e-socio, sed nur tre malgranda parto sukcesas. La plejmulto perdiĝas, ĉar trovas ne la imagitan profesion strukturon, aŭ pro tio, ĉar (i.a. pro manko de necesaj konoj) ne trovas sufiĉan kontaktiĝan punkton kun ĝi. Decida plimulto de novaj esperanto-parolantoj retiriĝas, perdiĝas por la movado, kaj poste ili kompreneble forgesos ankaŭ la lingvon mem!

### Kio kunligas la esperantistojn?

Kio do tamen kunligas tiujn homojn, kiuj restis, restas en tiu nedifinita e-socio? Kio do estas tiu mistika kunligilo, kio produktas la senton de "aparteno unu al la alia"?

Diversaj filozofioj konceptas la nocion *nacieco* diversmaniere. Kiel pli-malpli komunaj trajtoj de tiuj difinoj estas la akcepto de nepraj ekzistoj de

- » komuna lingvo;
- » komuna historio;
- » komuna kulturo;
- » ekzisto de iatipa (eĉ tre malstrikta) interna strukturo;
- » ekzisto de komunaj kutimoj, tradicioj;
- » ekzisto de komuna valor sistemo (sed ne nepre akceptenda far ĉiu);
- » komuna deveno.


Ni emfazas, ke tiuj estas la trajtoj de nacieco. Por *nacieco* aldoniĝas ankorau pluraj postuloj, kiel *komunarea loĝado*, *kunliga ekonomika sistemo* ktp, sed tiuj **ne rilatas al nia temo**.

Estas evidente, ke ni, *esperantistoj* havas preskaŭ ĉion supre listigitan. Ni havas komunan lingvon, historion, kulturon (ne nur en strikta senco kiel muzika, literatura ktp, sed komprenu ĝin en pli vasta senco, kiel ekz. kondukmaniero ktp). Gravas ne la kvanto de iu trajto, sed la kvalita demando: ĉu ni havas



jes, aŭ ne? Kompreneble ni havas komunajn kutimojn kaj tradiciojn, sed NE havas la komunan devenon.

Kia diferenco estas ekz. inter la en-Hungario diaspore (!) loĝantaj germanoj, slavo, rumanoj ktp. kaj la esperantistoj? Krom ilia komuna deveno kaj ekzisto de ilia patruj-lando ŝajne nenio. Aŭ kia diferenco estas inter la palestinoj, ciganoj, judoj (ekster Israelo) kaj ni? Ankaŭ ili vivas diaspore, kaj ne havas patruj-landon. La diferenco estas ilia komuna deveno (kaj kompreneble ilia jam ekzistanta konscio)!



La deveno kompreneble estas tre grava demando, - sed ne ĉion-decida laŭ mi. Vidu la ekzemplojn de beb-ĝe al eksterlando forbitaj infanoj ("turkaj janiĉaroj"), aŭ de homoj

naskitaj ekz. en Hungario, ekde sia beb-ĝe (aŭ tre juna aĝo) estas edukitaj far fremdaj "gepatroj" en Usono aŭ Aŭstralio. Ili mencias Hungarion kiel naskiĝ-lando, sed konsideras sin usonano aŭ aŭstraliano.

**La eduko do estas la faktoro, kiu difinas la konscion de aparteneco de la homo!**

La infano ekde la komenco (ĉu konscie aŭ nekonscie) estas edukata senti sin ano de iu naci(ec)o. Per diversaj rimajoj, versoj en la infangardeno, la literaturaj verkoj kaj historio en la lernejo, politiko en la plenkreska aĝo. Krom tio kompreneble la nacia flago, koloroj, himno ktp. ĉio kreskigas tiun senton.

### Ŝokaj pensoj kaj konkludoj

El la supraj aferoj sekvas, ke ni, la esperanto popolo NE estas nacieco, sed ni havas tre similajn trajtojn al ĝi!

Tio estas ege grava, ĉar - se tiuj ĉi pensoj estas pravaj - la konkludoj el tio nepre influas nian estontan strategion kaj taktikon.

Se en la baldaŭa estonto esperanto atingos la "finan venkon (= dua lingvo por ĉiu sur la Tero)", ĉiuj niaj problemoj estos solvitaj. Se tio ne okazos (kaj reale ne okazos), kaj ni ne volas malaperi simile al multaj malaperintaj en historio naciecoj, eĉ nacioj, se ni volas paŝi al iu kvalite (!) pli alta ŝtupo, ni devas zorgi pri tio, ke la novaj esperanto-parolantoj iĝu esperantistoj, do ni devas zorgi pri ilia eduko!

**Ni devas solvi la problemon, ke ili konu ne nur la lingvon (tio NE sufiĉas), sed ankaŭ nian historion, kulturon ktp, ni devas vekti la konscion de esperantisteco, kaj ni en ĉiu paŝo devas flegi la senton por aparteni al la internacia esperanto-komunumo.**

Mi scias, ke tiuj ĉi pensoj estas ŝokaj je la unua vido, tamen ili inkluzive klarigas la *internan ideon*, la hezitan voj-serĉon de Raŭmo, kaj povas montri iun elirovjon el la nuna stagna situacio.

Mi ripetas, ke laŭ mi ni NE estas nacieco, sed pro la tre similaj trajtoj ni devas transpreni iliajn metodojn. Ĉu mi estas prava, aŭ estas ie en la vico nelogikaĵo?

*Szilvási László, Hungario*

## Viziti Varsovion

Tramo kaj buso tage kostas: bileto - 4.000 PZL (polaj zlotoj). Notu, ke busoj funkcias ankaŭ nokte. **NOKTBILETO** kostas 12.000 PZL kaj ilia ĉefa haltejo estas proksime de stacidomo *Warszawa Centralna* en la centro de la urbo. Taksio estas tro kosta, sed se vi nepre bezonas ĝin, prenu nur la polajn aŭtomobilojn. En aliaj ofte vi povas trafi ruzan kaj avidan aŭtiston...

Meza tagnokto en normalaj **HOTELOJ** kostas ĉ. 300.000 PZL. Tamen ni konas ne tiom komfortajn hotelojn, certe ne en la centro de la urbo, sed tie ĝi kostas ĉ. 40.000 PZL - so-

nas iom aliel, ĉu ne? Sed se vi vojaĝas, ne komerce, kaj vi bezonas lokon por du tagoj, informu nin kaj certe vi ricevos senpagan liton!

Kurzoj laŭ la Pola Nacia Banko (31.05.92.)

1 NLG = 7.654 PLZ  
1 DEM = 8.662 PLZ  
1 USD = 13.846 PLZ

Por **TELEFONI** vi devas aĉeti ĵetonojn, sed atentu - estas du specoj: **A kaj B**. La **A** kostas 600 PZL, sufiĉas por 3 min. de interparolo ene de Varsovio, **B** kostas 6.000 PZL por eksterurba konekto.

**MANGĜI** vi povas malmultekoste en bufedo pole **BAR**. Ne pensu tamen, ke ĉe stacidono

moj tio estas malmultekoste. Certe ne!

Se vi intencas gvidhelpon ĉi tie, skribu al ni, kaj ni trovos al Vi senpagan tempon. Skribu al ni:

*Varsovia E-Klubo "Vento",  
Ireneusz Bobrzak, ul. Torunska 82/133,  
PL-03226 Warszawa, Polio.  
laŭ Varsovia Vento, majo-1992.*

*Tre ĝoje ni trovis tiun artikolon en la Varsovia bulteno. Ĝoje ni akceptus similajn informojn (maksimume en tiu ĉi longo!!!) el aliaj ĉefurboj kaj turismaj centroj.*

*La Red.*

## Faka aplikado

### AGI FAKE

Konsiderante, ke esperanto ne sufiĉe uzigas en ĉiuj profesioj, diversaj esperantistoj proponas krei asocion por uzi esperanton fake (vi eble ricevis leterojn el Francio, Hungario, ktp.).

Por uzi esperanton en sia profesio, por disvastigi ĝin larĝskale, fondi pliajn asociojn ne estas la ĝusta vojo. Kion ni povas fari en la jam ekzistantaj kadroj?

1. paroli pri esperanto ĉirkaŭ si, al siaj kolegoj, ktp.
2. laŭ la profesio aŭ fako montri al ili "hazarde" dokumentojn (el *Monato*, *El Popola Ĉinio*) kiuj ne estas alireblaj al ili, sed jes al vi;
3. kontakti sian Asocion de Entreprenistoj kaj peti staĝon pri esperanto, rapidan kurson, donante la adreson de la landa e-asocio;
4. verki nacilingvan artikolon pri esperanto por via profesia aŭ sindikata gazeto;
5. aliĝi al faka esperanto-asocio, se ĝi ekzistas;
6. kompili dokumentojn, gazetartikolojn pri la fako; proponi sian helpon al la faka asocio aŭ al via landa e-asocio;
7. traduki fakajn artikolojn al esperanto;
8. okaze de stud-profesi-fak-vojaĝo eksterlande, kontakti la esperantistojn (bela pruvo pri via "pulso");
9. peri kontaktojn por via firmao per esperanto;
- 10 ktp. Vi povas aldoni ion.

Dankon pro via afableco raportu pri viaj klopodoj!

Renée TRIOLLE  
laŭ "Franca Esperantisto" nro. 422.

## Ekologiistoj serĉas komunan lingvon

En la kolumnoj de la gazeto "Inter Ni" aperis informo pri la UN-Forumo, okazinta en junio en Rio de Janeiro. Necesas aldoni, ke kelkajn tagojn pli frue (30-an kaj 31-an de majo) samloke okazis mondkongreso de ekologiistoj-verduloj, kiu celas instigi la UN-Forumon ellabori ampleksan ekologian programon por savi la vivon sur la tero: ankaŭ la demando pri esperanto estis planita por pritraktado.



En novembro 1989, la politika movado de la francaj ekologiistoj per voĉdono decidis enkonduki esperanton kiel laborlingvon. Sekve de tio, alilandaj verdpartioj (Ukrainio, Irlando, Italio) decidis same. Unuafoje, en 1991, esperanto estis utiligata kiel traduk- kaj interpretlingvo - apud la angla, franca kaj germana - en la eŭropa ekologia kongreso en Zŭrich. Jam de jaroj funkcias en Francio komisiono por disvastigi la internacian lingvon ĉe ekologiistoj kaj verdpartianoj. Ĝia komisiito estas:

Jacques Morin,  
Villa Basque Appl, 15 rue Prof. Calmette,  
F-65260 Pierrefitte Nestalas, Francio.  
Laŭ "Inter Ni", No 4/92.

## Servo pri juda kulturo

Ni ekinteresiĝas pri malkovro de konservitaj postsignoj pri juda kulturo en Pollando, ĉar ni ofte estis konfrontataj kun petoj de judoj el preskaŭ tutmondo, kiuj iam forlasis Pollandon kaj nuntempe serĉas diversajn informojn, atestojn, iujn ajnajn sciojn pri siaj antaŭuloj, pri siaj familioj.

Ni klopodas helpi al la petantoj, jene:

Ni serĉas naskiĝatestojn en civitan-ŝtataj oficejoj, ni faras genealogiajn transskribojn surbaze de konservitaj arkivaĵoj, ni faras fotojn kaj fotraportojn pri lokoj al ni indikitaj, ni fotas tombejojn, lapidarejojn, sinagogojn, domojn. Ni zorgas pri jura helpo koncerne havaĵon lasitan en Polio.

Ankaŭ ni organizas en Polio restadojn por personoj, kiuj deziras viziti patrujajn lokojn. Laŭdezure ni sendas librojn, prospektojn, eldonaĵojn, ktp.

Se iu de la legantoj bonvolus komunikiĝi kun ni, jen la adreso:

Iwona Brzewska  
u. Solec 30a-35. 00-403 Warszawa, Polio  
el *Israella Esperantisto*, oktobro 1991.

## TEĴA renaskiĝas

Kia estus la Esperanto-Movado sen gazetoj kaj revuoj, sen radioprogramoj? Dekomence tiuj ĉi komunikiloj ludis tre gravan rolon, danke al la sindonemo de redaktantoj kaj verkantoj. Des pli bedaŭrinde estis, ke dum la pasintaj jaroj ties fakasocio Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio, TEĴA praktike ne funkciis.



Nun ties nova estraro sub gvido de prezidanto Stefan Maul energie klopodas reaktivigi la asocion. Jam reaperis la asocia organo *Internacia Ĵurnalisto*. Ĝia unua numero eliris en aŭtuno 1991, ekde januaro 1992. ĝi regule aperas kvar fojojn jare, redaktata de Stefan Maul, ĉefredaktoro de *Monato* ĝis fino de 1991. TEĴA pro la stagnado pasinttempa perdis multajn membrojn, precipe en okcidentaj landoj. "Estas tre malfacile reakiri perditan fidon, plendas Maul kaj alvokas ĝiuajn profesiajn kaj amatorajn gekolegojn, mebrigi en TEĴA".

Se vi havas intereson, petu aliĝilon kaj/aŭ provnumeron de la revuo ĉe la administrado de TEĴA (Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio) aŭ rekte ĉe Stefan Maul, Pferseer Str. 15, DW-8900 Augsburg, Germanio.

## Komerca aplikado

Ni serĉas mondvasse liverantojn pri materialo kaj komponeroj por nia fabrikado de elektromotoroj malalttensiaj. Bv. anonci vin esperantlingve:

Robert BOSCH GmbH,  
Uzino Bŭhl, Aĉetsekcio,  
Franz Josef Braun,  
Pf. 1163, DW-7580 Bŭhl, Germanio.  
Laŭ "La Merkato", aprilo, 1992.

### Rabato por esperantistoj

En la franca ĉefurbo Paris tri-stela hotelo *GARNIER*, kun cent dorm-ĉambroj, proponas rabatojn al esperantistoj.


Por pliaj informoj kontaktu "Erik", de dimanĉo ĝis merkredo inter horoj (francaj) 15-20 per telefono (1)43873550, fakso (1)43870329 aŭ telekso 283161.

La hotelo troviĝas apud la grandaj magazenoj *Galeries Lafayette*, *Le Printemps*, *Brummel*, je kelkaj centoj da metroj de *Magdalena*-preĝejo, de *Operdomo*, de *Monteto Montmarte*, de *Konkordplaco*, de *Elizeaj Kampoj*, kaj kun rektaj interligaj buslinioj aŭ metrolinioj al *Notre-Dame*, al *Ekspoziciejo de Porte de Versailles*, k.a.

### Nova gazeto "La Komercesto"

Universaal-Kooperativ Aitai en Parnu, Estonio eldonas novan 16-paĝan komercan gazeton "La Komercesto" en eldonkvanto 50.000! Pri abon- kaj raklamtarifoj pliaj informoj haveblas ĉe:

pk. 100, 203600 Parnu, Estonio.  
laŭ *Voko el Stirio*, julio/92.



Ni proponas al vi niajn kupraĵojn (konstruelementoj kaj ornamoj, donacoj, mebloj) kaj ankaŭ niajn belajn murbildojn kun diversaj motivoj, kiel ekz. ondoj kaj arbo, en eleganta aspekto, kun modesta prezo.

Agentejo SORTIMENTO,  
H-6100 Kiskunfélegyháza, pk. 138, Hungario.

Pri turismaj aferoj al okcidento viajn ofertojn atendas

s-ro H. Al-Amily, 134 Brent Rd., Southall,  
UB2 5LD, Gr. Londono, Britio.  
Telefakso: 071-828.9316  
(LM n-ro 36)

## Arangoj

### INTERAMIK'- 1 en Kievo

Kieva Kultur-komerca centro "Esperanto" kaj E-klubo KARE organizas internacian someran renkontiĝon inter la 22-a kaj 28-a de aŭgusto 1992, en ripozejo 30 km for de Kievo, en pina arbaro, apud lago por 250 esperantistoj el la tuta mondo.



Aliĝkotiĝo por KŜS-anoj 200 rubloj; partoprenkotiĝo (inkluzivas ankaŭ 3-fojan manĝadon) varias inter 6 kaj 200 dolaroj laŭ landoj kaj loĝkondiĉoj (2-lita aŭ 6-lita ĉambro kaj propra tendo). Orientkaj okcident-eŭropanoj la tutan sumon pagos surloke. Hungaroj petu aliĝilon kaj pagu al LINGVO-Studio.

Por ricevi pluajn informojn kontaktu:

Centro "Esperanto",  
254200, Kievo-200, Pk. 539/1, Ukrainio,  
aŭ telefono: Lineckij Mihail,  
+7-044-4328777 (oficejo).

### Seminario en mineralbanejo!



Unu el la bulgaraj mineralbanejoj situas 18 km-ojn okcidente de urbo Haskovo. Tie la mineralakvo varmas 59°, kaj tio tre utilas por batali artikulaciajn, periferinervajn kaj arteriosklerozajn malsanojn. Se vi bonŝance estas sanaj, tamen vi estas same invitataj al tiu sanatorio por Esperanto-Seminario/Feriado, kiu okazos ekde la 20a ĝis la 30a de aŭgusto, ĉijare. Loĝado en dulitaj ĉambroj kun komuna banejo (plus terapiaj basenoj kaj bankuvoj) kostos ne pli ol 3 dolarojn tage; manĝoj ne pli ol 2 dolarojn. Por detalaj informoj skribu al:

Penjo G. Stojanov,  
ul. Lenin 31-a, BG-6300 Haskovo, Bulgario.  
laŭ l'Esperanto (IEF), 2/92.

## Esperanto defendata


Antaŭ du kaj duona jaro mi aniĝis al al Amikaro Bruno Gröning, kiu sciigas al la homoj, saniĝi per spiritaj fortoj. Pere de la doktrino de Bruno Gröning mi evitis la frupensiuliĝon.

La gvidantino de la tuta amikaro, s-ino Grete Hausler ĉiam denove petis pri tradukoj al aliaj lingvoj. Mi mem ne kredis, ke esperanto ne estus taŭga por tio, ĉar oni havis informstanojn en urboj. Por tio esperanto ne estas utila. Post interparolo kun ŝi, ŝi sentis, ke ni uzu ankaŭ Esperanton. Multaj el la amikaro sin demandis, kial nun ankaŭ tiu afero aŭ diris: "Es-

## Eŭska Montara Aventuro

Eŭska Esperanto-Junularo invitas al somera renkontiĝo en Alsasua, urbeto situanta ĉ. 50 km. sude de San Sebastian/Donostia. Ĉi okazos de la 13a ĝis 18a de aŭgusto '92. La programo konsistas el tuttagaj aŭ duontagaj surmontaj promenadoj kaj kulturaj ekskursoj al proksimaj vidindaĵoj. La kotizoj estas 10.000 ESP (ĝis 26 jaraĵ), respektive 13.000 ESP (pli ol 26 j.) Pliaj informoj ĉe:

Antton Ameyugo, Gorbea, 4-2.dcha.,  
E-01008 Vitoria-Gasteiz, Hispanio.  
Koncize 3/92.



## Naturista Tendaro

Familia Naturista Esperantista Tendaro (FNET) denove okazos ĉijare apud Przemysl ĉe la rivero San inter la 1-a kaj 10-a de aŭgusto. Informojn petu ĉe:

Boleslav Galanty,  
ul. Sw. Jana 10/1, PL-37-700 Przemysl, Polio.  
laŭ "Naturista Vivo", n-ro 19.

## Kanada Esperanto-Kongresokadre de IJK!

La Kanada Esperanto-Kongreso (KEK) okazos en Montrealo inter la 7a kaj 9a de aŭgusto, kadre de la Internacia Junulara Kongreso en Collège du Maisonneuve.

Estas antaŭvidata partopreno en la festoj de la 350-jariĝo de Montrealo, esperanto-ekzamenoj, kunsido pri reaktivigo de Junularo Esperantista Kanada, partopreno en la internacia vespero de IJK, ktp.

Estas ebleco partopreni nur KEK, aŭ favorpreze ambaŭ kongresojn: KEK kaj IJK. Pliaj informoj ĉe:

Esperanto-Societo Kebekia,  
6358-A, rue de Bordeaux, Montréal, Québec,  
H2G 2R8, Kanado.  
Telefon-respondilo: (514) 272-0151.  
laŭ "La Riverego", somero de 1992.

peranto ja estas la lingvo, kiu malsukcesis." Ankaŭ persono, kiun mi enkondukis en la doktrinon de Bruno Gröning aŭdis tiun frazon. Tiam li respondis: "Sen esperanto mi ne scius pri la spiritaj fortoj por saniĝi." Intertempe pli ol 50 esperantistoj el 22 landoj havas kontakton al la amikaro kaj ĉiuj skeptikuloj el la 7500 amikoj de Bruno Gröning konvinkiĝis pri la utilo de Esperanto. Ni jam ricevis ofertojn por tradukoj al aliaj lingvoj.

Se nun la esperantistoj sciigas al neesperantistoj la doktrinon por saniĝi per spiritaj fortoj, tiuj, kiuj saniĝos, certe ankaŭ konvinkiĝos pri la utilo de la lingvo esperanto.

Detlef Meier, Germanio

## Renkontiĝo kun Nemere en IJS!

Al la ĉi-jara IJS (03-09. en aŭgusto) aliĝis ĝis nun ĉ. 100 esperantistoj el 15 landoj.



La IJS-ejo situas apud la bordo de Danubo, je 5 km-oj inter la urbo Esztergom kaj Budapeŝto, en la Junulara Centro "Búbánatvölgy".

IJS-n vizitos ankaŭ István Nemere (04.08.92) por fari

prelegon, respondi al la demandoj, kaj dediĉi siajn librojn. (Ankaŭ surloke aĉeteblaj en la IJS-libroservo).

Vi povas ankaŭ surloke aliĝi al IJS!



## 20 jaroj de PSEK!

Por jubilei la 20-an jaron de ekzisto de PSEK, la 14a Somera Studenta Esperanto-Renkonto en Gdansk (17-23.08.92.) estas dediĉita al la jubileo. Al la renkontiĝo oni aparte invitis ĉiujn iamajn aktivulojn de PSEK. La aranĝon SSER kronos la Jubilea Balo la 22-an de aŭgusto.

La semajna programo de SSER antaŭvidas varian programon, ekskursojn, diskutojn. La kotizo (kun loĝado en 2-3 litaj ĉambroj, manĝado, programero) estas ĉ. 230 DEM. Netranspagipovantoj ricevas rabaton de 40 DEM. Eblas partopreni nur la Jubilean balon por 70 markoj.

Petu pluajn informojn ĉe:

PSEK, Adam Cholewinski prez.,  
ul. Kolobrzaska 42, D/76, PL-80394 Gdansk,  
tel: +48-58-534603.

## Kunvojaĝanto serĉata!

Mi veturos al la UK en Vieno, kaj serĉas kunvojaĝantojn! Ekveturo la 25-an de julio antaŭtagmeze de Budapeŝto.

Sárközi János,  
Királyok u. 229, H-1039 Budapeŝto,  
Telefono: 1688849.

Veturante al e-aranĝo per aŭto,  
dividu la benzinkostojn!  
Trovu kunvojaĝantojn  
en tiu ĉi rubriko!

## Kulturo

### Teatro en kofro

Tomáš PLASZKY estas unu el la protagonistoj de la pupistoj en Ĉeĥoslovakio. Li klopodas prepari spontaneajn kaj buntajn prezentadojn, kiuj aperas de direkta kontakto kun spektantoj eluzante diversajn pupistajn kaj teatrajn teknikojn, artaĵformon, aktorparoladon kaj muzikon. Tiucele li kreas sian propran spaccon, sian scenejan mondon, kiu estas kaŝita en kofroj. Li povas iniciati propran fantazion kaj kreadon ĉe spektanto kun tio, kion li proponas por li en siaj spektakloj. Li proponas komplikajn pupteknikojn kombinitajn kun simila ŝanĝo de aĝoj en teatraj simboloj kaj drama staturo.

La scenaranoj de la teatraĵoj ebligas prezenti ilin ankaŭ en modestaj, ne teatraj specaj kondiĉoj, ankaŭ en la naturo. La repertuaro de la teatro donas por ĉiu-aĝa kategorio agrablan amuzon kaj neforgeblajn spertojn.



Tomáš PLASZKY akiris kelkajn eminentajn premiojn en la ĉeĥoslovakaj kaj internaciaj festivaloj. Li reprezentis la slovakajn pupartojn en Jugoslavio, Svedio, Pollando, Germanio, Sovetunio, Francio kaj multfoje en Hungario. Li regule ludas en pupteatraj programoj por infanoj en la ĉeĥoslovaka televido.

*Teatro en kofro* prezentas 50 minutan programon por infanoj kaj por plenkreskuloj sekvajn soloprezentaĵojn: Janĉjo Pizeto, Prezentaĵo de fantometoj kaj Solo por piano.

La teatraĵo *Sorĉludo de klaŭno* estas 60 minuta pupa cirk-spektakla klaŭnaĵo.

La teatraĵo *Solo por piano kaj Prezentaĵo de fantometoj* estas konvena ankaŭ por amuzejoj, variet-teatroj kaj estradprogramoj.

La ensemblo konsistas el du personoj - pupsolisto Tomáš Plaszký kaj asistantino Marian-na Plaszková.

Kontaktadreso:

*Teatro en kofro,*  
Tomáš PLASZKY,  
Olbrachtova 8, CS-040 01 Košice,  
Ĉeĥoslovakio, (Tel: +42-95-69647).

## La radikoj de nia literaturo

Oni ofte diras, ke la originala literaturo de nia lingvo komenciĝis jam en la Unua Libro, en kiu Zamenhof presigis sian poemon "Ho mia kor". Tamen estas ankaŭ fakto, ke originalaj verkoj estis maloftaj kaj de multaj personoj malalte taksataj dum la unuaj preskaŭ dudek jaroj de la movado. Aperis en diversaj revuoj manpleno da poemoj, plejparte banalaj kaj senvaloraj, kaj unu-du rakontoj, el kiuj eble nur "En brik-ejo" (1888) de Wasniewski

estis vere atentinda.

Efektive, ne malmultaj esperantistoj asertis, tiam kaj ankaŭ poste, ke originala literaturo en esperanto estas io tute superflua kaj nebezona! Laŭ ili, necesis nur traduki kadi el la naciaj literaturoj. Ŝajnas, ke laŭ ili esperanto ekzistis nur kvazaŭ speco de servanto por la regantaj, "naturaj" lingvoj kaj ties potence valoraj literaturoj.

Kompreneble, ne ĉiuj havis tiun opinion. En *Lingvo Internacia* (1901, p.86) M.S.

Rakitski skribis: *Nur originala verko povas pruvi al la mondo, ke nia lingvo estas vivanta.* En tiu epoko, antaŭ 90 jaroj, tiu penso estis sufiĉe aŭdaca: nome ke esperanto estu vivanta lingvo de aparta socia grupo ("grava por ni"). Ke ĝi estas tia, tion jam pruvis ĝia historio; kaj hodiaŭ estas ĝenerale akceptate, ke tia grupo postulas propran kulturon, al kiu nepre kontribuas propra originala literaturo.

William Auld, *Britio*  
Kontaktio 1991/2.

## Movada lernejo

### La agado E-3

Certe vi jam aŭdis pri la multaj, nenecese blindaj homoj en Afriko. Kaŭzo ofte estas la malpura akvo, kio infektas la okulojn kies sekvo estas la malrapida blindiĝo - pro manko de okulkuracistaj servoj.

En 1966 la nederlanda ĵurnalisto Jacques Tuinder el la u. Heemskerk decidis starigi "fondaĵon" por subvencii la projekton E3. Li petis la esperantistojn kunlabori por "esperigi la esperantojn". De tie devenas la nomo: E3 = Esperantistoj Esperigas Esperantojn.

La agado E3 neniam fariĝis granda organizaĵo. S-ro Tuinder ĉion aranĝas apud sia ordinara laboro en sia libertempo, kaj lin helpas aro de esperantistoj, agadantaj en sia propra lando. La enspezoj de Agado E3 estas liberrolaj donacoj de esperantistoj kaj de aliaj homoj kun bona volo. (la Agado E3 klopodas monigi la varojn, donace senditaj el Orienta Eŭropo).

Dum la 25-jara agado estis atingitaj multaj kaj multaj sukcesoj. Nur kelkaj el ili:

*Ganao:* Daŭra subteno al tri optikaj laborejoj per maŝinoj, instrumentoj, kaj similaj.

*Kamerunio:* Kompleta okulkliniko interne de ekzistanta malsanulejo.

*Kenjo:* Veturanta kliniko; diversmaniera helpo al bone funkcia okulhospitalo i.a. per

## Alvoko!

La esperanta kulturo estas i.a. kulturo de libroj. Tamen: la esperantaj libroj ne bone vendiĝas. La libro-merkato estas terure malgranda - pli malgranda ol oni kredus! Ekzistas proksimume nur 100 esperantistoj en okcidento, kiuj pretas aĉeti literaturan verkon! La rezulto: deficitaj, stagno de eldonado kaj malkuraĝigo de verkistoj. Aliflanke oni plendas pri altaj prezoj - sed kiel atingi malmultekostecon, se 300 estas sufiĉa eldonkvanto vendota nur post pluraj jaroj?

Por garantii la daŭrigon de sia eldona agado, la eldonejo Pro Esperanto Vieno devas iri novajn vojojn. Kaj pro tio ni direktas al vi la jenan ofertan:

### Vi havu rabatojn!

Se vi decidis aŭtomate aĉeti ĉiun nove aperantan titolon de Pro Esperanto, vi ne pagos sendokostojn.

Ekde la momento, kiam 30 aliaj personoj faros same, vi ricevos 10 %-an rabaton. Ekde 60 personoj la rabato altiĝas al 20 %, kaj ekde 90 personoj al 33,3 %! Kvankam la nombro de la unuaj tridek personoj ankoraŭ ne estas plene atingita, jam nun vi ricevas dekprocentan rabaton!

Ni devas malrapidigi nian eldon-ritmon - pro manko de mono. Do, ne timu, ke vi devigas vin aĉeti tro da libroj.

Publikiĝas ĉe Pro Esperanto ankaŭ broŝuroj en etnaj lingvoj. Sed vi havas la eblon malakcepti ilin.

Se vi ne loĝas en Aŭstrio, ni faciligas al vi la pagadon: Vi ne unuope pagos la librojn, sed vi ricevos proksimume nur unu- aŭ dufoje en la jaro la kolektivan fakturon, pageblan al nia UEA-konto aŭ al nia poŝtĉekkonto en Vieno.

### Sendu la formularon

Se tiu oferto interesas vin, bv. resendi konfirman formularon kun la jenaj datumoj:

Via nomo kaj preciza adreso.

\*Mi aŭtomate mendas po unu ekzemplero de ĉiu nova titolo de Pro Esperanto. Mi limigas tiun aŭtomatan mendon al la jenaj lingvoj: esperanto, .... (bv. aldoni eventuale etnajn lingvojn - ĉar Pro Esperanto ankaŭ publikigas pri esperanto en la germana, franca, angla, itala ...). Mi pagas al via UEA konto/Viena poŝtĉekkonto (forstrek la nevalidan). \* Tiu daŭra mendo estas nuligebla per simpla skriba komunikado al Pro Esperanto, P.f. 28, A-1014 Wien, Aŭstrio.

instrumentoj kaj fakliteraturo.

*Malavio:* Veturanta okulkliniko.

*Nikaragvo:* Brajl-presejo kaj centro por laborkapabligo.

*Vietnamio:* Financa kontribuo por starigi uzinon de artefaritaj okuloj, ktp.

Ankaŭ nun daŭras pluraj projektoj ekz. en Kamerunio, Tanzanio kaj Nikaragvo.

Nun, post 25 jaroj, Tuinder kaj lia edzino decidis transigi la aferon al formala institucio. Por partopreni en tiu nobla kampanjo, petu pluajn informojn ĉe:

Agado E3, *Henegouwlaan 35,*

*NL-1966 RH Heemskerk, Nederlando.*

Laŭ *La Espero (SEF) 4/91,*  
kaj *Bulteno Nijmegen marto/92.*

## Lingvo

### Ĉu LKK?

La mallongigo LKK komence signifis "Loka Kongresa Komitato", kiu en la kongresurbo faris la *teknikajn* preparlaborojn de iu kongreso. Sed kio nun?

Kontraŭ multaj aliaj lingvoj povas esperanto gaskoni pro sia povo fari novajn vortojn, i.a. per sia aglutin-kapableco. En certaj aliaj lingvoj neologismo-formado ŝajnas malfacila. Tio verŝajne estas la origina kaŭzo de la ĉie kreskanta akronimo-farado (la kunmeto de la komencaj literoj de grupo da vortoj al kvazaŭ nova "vorto") kiu eble taŭgas en framasonologioj, sed nepre ne ekster ili. Sed esperanto bedaŭrinde sekvas la mondon — kaj stumblegas:

Hazarde mi elektas anoncon (*Monato*, 1991/12, p. 31) en kiu interalie estas menciataj "duŝo kaj WC". Ĉu WC estas esperanta vorto? Eble internacia? Mi ne sciis pri la menciitaj *Ekumena Esperanto-Kongreso* kaj *Esperanto Kongreso por Blinduloj*, sed mi komprenas. Mi eltrovis SAT-kongreson, sed ne GEA-kongreson. Informo pri ĉambroperado: LKK jam marĉandis pri la ĉambroprezoj, kaj LKK mem zorgas pri la tranoktoj. Sed kio estas LKK? Mi serĉas en la teksto. Ĝi komenciĝas: "La konata kongresurbo..." LKK povas signifi tion — aŭ la dua alineo: "La kongresejo Kolpinghaus". Finfine en la fino de la anonco mi trovas la solvon de la enigmo. LKK signifas: *Esperanto-Press Augsburg!*

Jeffrei Henriksen, Ferojo  
(el *Monato* aprilo-1992)

### Pli ol 100 aliĝoj al IJK!

Al la Internacia Junulara Kongreso en Montrealo jam aliĝis 110 personoj el 29 mondpartoj!



Se vi intencas partopreni, sed ne dormi en la Kolegio Maisonneuve, kie okazos la aranĝo, vi simple subtrahu 60 dolarojn de la pagenda kotizo. La IJK-n eblas partopreni ankaŭ kiel mezorganto, ĉi kaze la kotizo estas nur 100 dolaroj.

LKK havas tagnokte funkciantan telefonan respondilon: +1-514-2720151.

laŭ "La Riverego, printempo 1992"

### Esperanto-renkonto dum POPOLARTA FOIRO KAJ FOLKLORA FESTIVALO!

Mezötur, Hungario, 27-31.08.92.

Pliaj detaloj en la sekva numero.

## Esperanto en radio

### Esperanto malpliigis en la radio

La unuaj monatoj de ĉi-jaro estis vere malfeliĉaj al esperanto-movado. Pola Radio (eksa Radio Polonio) reduktis sian elsendadon en Esperanto. Malaperis la internacia lingvo en Estona Radio kaj la lasta bato estis, ke Svisa Radio Internacia finis sian disaŭdigon per Esperanto.

Koncerne Polan Radion okazis tio, kion fidelaj aŭskultantoj antaŭkonkludis kaj -timis. Ankoraŭ en 1989 la stacio emisiis per esperanto ses foje tage. Nun nur du foje. La falo estas rapida! Nia lingvo ne estis la sola, kiun trafis la ago. Pasintjare oni rezignis pri la araba, dana kaj hispana, ĉi-jare franca, itala, finna kaj sveda lingvoj. La fakto, ke esperanto estis la dua post la germana lingvo, kalkulante per raportoj de la aŭskultantoj, savis nian lingvon konservi sian ekziston inter elsendataj lingvoj. Tio tre gravas, ĉar laŭ profesia redaktado kaj plejofte disaŭdigo Pola Radio staris kaj plu staras super la aliaj. Tamen restas timiga demando, kio okazos en daŭro? La respondon pesimistoj -realistoj - povas antaŭkonkludi sed timas laŭte diri...

La malapero de esperanto en Estona Radio evidentiĝis sen ia ajn antaŭ- aŭ postinformo ekde ĉi-jaro. La ŝajna ĉeso estas bedaŭrinda, ĉar relative multaj finnaj esperantistoj kutimiĝis aŭskulti la stacion.

Se la reduktoj ĉe Pola Radio estis iel antaŭkonkludeblaj, la malapero de esperanto en



elsendoj de Svisa Radio Internacia estis tute neatendita. Finiĝis ja 40-jara periodo en esperanto. Laŭ ofteco la elsendoj, aŭdeblaj en nia lando en du tagoj semajne, po kvin foje Svisa Radio estis la dua post Pola Radio. Tre ofte la stacio havis bonan aŭdeblecon.

Kiel kaŭzon de reduktado aŭ fino la redakcioj informis la ŝparon de sia registrado. Tamen malantaŭ la fakto eblas vidi ankaŭ alian kialon: En nuntempa malfermita Eŭropo tia radioinformado ne plu estas bezonata samgrade kiel

dum antaŭaj jardekoj. Unu kiu malprofitas de la ŝparado estas esperanto, ĉar kvankam la elsendoj havas forte sciigan rolon pri la aferoj kaj aranĝoj de la sendantaj landoj, ili tamen estas tre gravaj por la movado. Por nemalmultaj izolitaj esperantistoj ili ja estas preskaŭ la sola ebleco aŭdi Esperanton. Krome la stacioj disaŭdigas ankaŭ programerojn pri pure esperantaj temoj. Ne estas troige diri, ke ili havas ne nur edukan rolon por esperantistaro, sed ankaŭ evoluigan signifon por la lingvo esperanto.

Ideale estus, se UEA povus aĉeti elsendotempon el iu eŭropa radiostacio! La manko de propraj radioprogramoj spegulas malfortecon, precipe ekonomian, de esperanto-movado.

En nuna stato aktivaj esperantistoj povas per fidela aŭskultado kaj raportado influi al tio, ke esperanto konserviĝu en la atmosfero.

Esa Lång

Korekto: En supra skribaĵo informo pri la ĉeso de esperanto-elsendoj de Estona Radio estas malĝusta. La dimanĉ-matena elsendotempo foriĝis, sed la ĵaŭdo-vespera restis kaj plilongigis ĝis 15 minutoj.

el *Esperantolehti*, 3/1992.

### Ĉu Esperanto-domo en Nico?

La nicaj esperantistoj projektas aĉeti loĝejon en Nico por gastigi esperantistajn turistojn en komfortaj ĉambroj je kosto multe malpli alta ol en hotelo.

Por tiu celo la tutmonda esperantistaro estas invitata aĉeti kuponon po 100 francaj frankoj (FRF) por unu. Tiuj kuponoj estos akceptataj kiel pago de la restad-kosto en Nico. Unu kupono pagos unu nokton en dulita ĉambro kun duŝo kaj necesoj. Do 100 FRF ponokte por unu aŭ du personoj.

Vi nur pruntedonos monon kiel pagon de via restado ĉe la lazura marbordo.


Por ĉiu informo bonvolu skribi al:

Nice -Esperanto, Les Hortensias 2,  
121 bis Boulevard Napoleon III.

F-06200 Nice, Francio  
laŭ Internacia Fervojisto 1/92.

## Muzika kulturo

### La plej nova E-sonkasedo!



Jus-ĵuse aperis la sonkasedo kaj teksto-libreto de Anjo Amika

### "Por vidi la mondon".

Kaj la ekstera aspekto, kaj la registra kvalito montras profesiajn ecojn. La allogaj melodioj de la kanzonoj,

inter ili pluraj internacie konataj, certe estos volonte aŭskultataj de ĉiuj aĝo-grupoj.

En viva koncerto Anjo Amika prezentos la kantojn ankaŭ dum la UK en Vieno.

Prezo de la kasedo: 21 guldenoj. Kontaktadreso:

Anna Lászay,

Öv u. 101. I/2, H-1141 Budapest, Hungario.

## Kiam ni kongresos?

(daŭrigo de la 1-a paĝo)

maniero de ilia realigado, agadkampoj kaj kampanjoj, ilia kunagordo, ktp. ktp. estas ja aferoj, kiuj bezonas internacian konsenton. Kaj kion ni vidas en la realo?

### Kial nur atendi la miraklon?

En plejmulto de esperantaj kongresoj la delegitoj foruzas la tempon por elekti la novan estraron, aŭ senfine traktas buĝet-proponon, kion fine neniu plenumas. En plej bona kazo oni listigas mankojn, dezirojn, revojn, - kaj poste hejmeniras, atendante la miraklon.

Sed kiam kaj kie oni okupiĝas pri la plej gravaj por ni aferoj? Kiam kaj kie oni analizas en landa kaj internacia niveloj la movadan situacion, kiam kaj kie oni decidas, konsentas pri komunaj agoj?

### Nepre necesas bona strategia plano

Post long-longa klopodo antaŭ tri jaroj estis akceptita nova strategia plano kaj t.n. 3-jara laborplano de UEA. Kvankam ankaŭ ĝi ne estas vera strategia kaj ĉefe ne laborplano (aŭ mi studis ion perfekte alian el la studobjekto *organiziko*), tamen ĉu iu kontrolas ĝian plenumon? Ĉu iu revizias la strategion, aŭ ĝi ne estas necesa? La oficerperiodo de la nuna UEA-estraro en julio finiĝas, kaj estas decidite ne trudi pretan laborplanon al la nova estraro. Do, ĝi komencu la tuton denove... Ĉu iuj iam resumas la agadon (aŭ ne-agadon) de t.n. fakaj asocioj de UEA? Aŭ la unufoje akiritita statuso validas poreterne?

Ankaŭ UEA-estraro ne estas ĉiopova. Krom tio ke ankaŭ ili laboras volontule (= sen-salajre) aldoniĝas, ke dum la estrarkunsidoj plejofte ili devas (???) okupiĝi pri teknikaj, financaj aferoj de C.O. anstataŭ pri kunagorda, organiza laboro.

En la lasta agadjaro estis aranĝitaj pluraj fakaj seminarioj. Pri la Internacia E-Forumo en Kaŭnas la landaj asocioj montris preskaŭ plenan indiferenton. Al la UEA-seminario pri informado alvenis plejparte homoj, kiuj havis libertempon, sed ne nepre fakajn konojn pri la temo. Al la t.n. "Eŭropa (??) Kongreso" venis nur delegitoj de kelkaj landoj...

Kie do oni decidas, zorgas pri niaj aferoj?

### Ĉu havi tradician kongreson, aŭ preferi amasan turisman renkontiĝon?

La Komitato de UEA teorie konsistas el la plej spertaj, plej influhavaj esperantistoj. Dum la UK ili estas kune, la solan fojon en la jaro. Ĉu oni ne devus pripensi, kiel plej efike utiligi tiun okazon?

Ĉu nia Esperantujo iam havos ankaŭ verajn kongresojn kun la tradicia senco?

Tiuj demandoj interesas multajn konsciajn esperantistojn. Por havi la respondojn, la paĝoj de *EVENTOJ* staras je la dispo de la komitatoj kaj de UEA kaj de SAT!

L. Szilvási, Budapeŝto



...Mi konsideris rimarkon de iu leganto, kiu dubas pri la daŭrigado de via revuo post iom da tempo, kaj kvankam mi ne esperas ke tio okazos, mi tamen demandis min, ĉu eblas akiri sufiĉe da interesaj artikoloj ĉiujn 14 tagojn nur pri la esperanto-movado?

Eble vi volas konsideri la eblecon plivastigi vian laborteron al internacie interesaj temoj, kiuj do ne rekte rilatas al nur e-o. Mi mem ekz. pensas pri diversaj rubrikaj, kiaj: Teknika angulo; Vojaĝoj al foraj landoj (sperto de vizitintoj); Diverslandaj edukaj sistemoj, ktp. Mi estas konvinkita, ke tiamaniere ankaŭ troviĝos facile diversaj aŭtoroj, kiuj verŝajne senpage volas regule kontribui al la gazeto. Por tiu celo almenaŭ mi volonte kunlaboros kun vi.

Tammo Kanter, Nederlando.

*Nia celo estas doni informojn pri la esperanto-movado. Ekzistas ja revuoj, kiuj specialigis al iu fako: beletraĵoj, enigmoj, fakaj artikoloj, ktp. Cetere jam ekzistas tia revuo, kiu havas la saman stilon, kion vi proponas: la magazino MONATO okupiĝas pri ĉio kio ne rilatas al la Movado, kaj ni okupiĝas pri ĉio, kio rilatas al esperanto. Tamen jes, ni havas konkretajn planojn de tempo al tempo aperigi laŭteme specialigitajn suplementojn (eventuale eĉ kajerojn) pri tekniko, vortaroj, literaturaj, ktp. Ilia apero dependas de nia financa stato (= nombro de abonantoj), kaj de nia restinta energio.*

L. Szilvási

Laŭ la ideo de Majk SADLER (nr-o 8, p.2) mi komparis mian aktivan vortopovon en la germana (mia gepatra lingvo), esperanto kaj diversaj "mondlingvoj". Jen la rezulto, sen uzo de vortaroj, sen postaj korektoj:

Monto, monteto, altebenaĵo. Germane: Berg, Hügel, Anhöhe, Hochebene. Angle: mountain, mountains. France: mont. Aliaj lingvoj: —

Mebloj: Tablo, tableto, seĝo, tabureto, lito, kradlito, sofo, fotelo, benko, skribotablo, bretaro, lampo, lustro, ŝranko, spegulo. Germane: la samaj. Angle: table, small table?, bed, bench?, lamp, mirror. France: table, siege, lit, fauteuil, lampe?, spegule?. Aliaj lingvoj: —

La sama rezulto ĉe korpopartoj, veturiloj,

verboj ktp, kvankam mi lernis la francan 8 jarojn, la latinan 6 jarojn, la anglan 2 jarojn kaj ankaŭ aliajn lingvojn!

Walter Klag, Aŭstrio

Atente mi legis leteron de s-ro T. Kanter (NL) pri E-Servo por Komercaj Interrilatoj (ESKI) en *EVENTOJ*, n-ro 8.

Pli malpli mi konsentas kun tia propono, kvankam mi opinias, ke por tia grava tasko, la kunlaborantoj ricevu salajron, eĉ etan.

Ĝenerala volontula agado iĝas amatora, neregula kaj diletanta; ĉiam ĝi restas dua-tria-eĉ kvara ranga!

Krome, tia ESKI nepre aktivu sine de kaj kunlaborante kun samcelaj fakorganizoj, kiuj jam ekzistas kiel IKEF kaj Monda Merkato. Kial dissigi niajn homfortojn, kiuj jam tro malmultas?

Alia erarego, laŭ mi, estas opinii, ke ESKI estu nepre senprofita. Senmone ne eblas sukceso agadi, nek nutri sin.

Germain Pirlot, Belgio

Responde al komentoj rilate al raporto pri tendaro SKOLTO'91, en *EVENTOJ* n-ro-4.

Dum la pasintaj jaroj finn-pola kunlaboro ene de Skolta Esperanto-Ligo floris pere de kunorganizitaj esperantokursoj por geskoltoj, partopreno en finna tendarego TERVAS per esperanta grupo internacia, kaj pinte, aranĝado de SKOLTO'91, internacia esperanta skolt-tendaro en suda Polio. La grupo de kunlaborantoj nun vastiĝis, kaj la tendaro SKOLTO'92 en Slovakio estas ĉefe aranĝata pere de slovakoj, polaj kaj belgaj fortoj.

Sed daŭre ni ne estas multaj. La kvanto de e-parolantaj geskoltoj kiuj havas la eblecon samtempe partopreni tendaron estas malgranda. Tial ni bonvenigas ankaŭ geskoltojn kiuj lernas esperanton, sed por la komencantoj ni havas aĝlimon de 14 jaroj por ebligi pli efikan instruadon. Bone parolantoj de ĉiuj aĝoj estas bonvenaj. Neskoltoj estas bonvenaj, se ili parolas esperanton kaj sincere volas partopreni skoltan tendaron - ja abundas skoltaj tradicioj. Ni memoru, ke skoltiĝo ne estas malpermesata al iu ajn, kiu sincere volas tion.

Sekvasomere ni ne planas aranĝi SEL-tendaron, sed kune partopreni skoltan tendaregon en norda Germanio inter la 23a de julio kaj 2a de aŭgusto 1993. Pri tio montru vian interesiĝon al: Martin Bähr, Ladenbeker Furtweg 256, DW-2050 Hamburg 80, Germanio, tel.: +49-40-7385146. Li atendas multajn informpetojn.

Carola Antskog,

SEL-reprezentanto en Finnlando.

# MONATO

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

MONATO - Internacia sendependa magazino pri politiko, ekonomiko, kulturo.

En esperanto pri ĉio interesa, kio ne rilatas al la movado! Formato A-4, 32 paĝoj, kolora kovrilo! La plej prestiĝa nemovada revuo kun 200 konstantaj kunlaborantoj! La abonprezo varias laŭ landoj. Petu provexempleron ĉe: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

EVENTOJ, eszperantó nyelvű információs lap.  
Nyt. sz.: B/TSZL/85/1991. ISSN 01215-959 X.  
A kiadó és a szerkesztőség címe:  
H-1675 Budapest, pf. 87. Tel.: 1288258.  
Megjelenik kéthetente. Kézbesíti a HELJUR.  
Készült az M & M nyomdában:  
H-1161 Budapest, Bercsényi u. 10.  
EVENTOJ, dusemajna gazeto pri la esperanto-movado.  
Eldonas Kultura Esperanto-Asocio  
kaj LINGVO-Studio, Budapest.  
Respondeca eldonanto kaj ĉefredaktoro László Szilvási.  
La redakcio ne nepre konsentas pri la enhavo de unuopaj artikoloj, kaj ne respondecas pri la anonc-enhavo.

## Anoncetoj

Filatelistoj, kiuj deziras interŝanĝi poŝtmarkojn, bv. skribi al:

Filatelista Asocio VÖPh,  
Getreidemarkt 1, A-1060 Wien, Aŭstrio.

\*\*\*\*\*

Mi volonte kolektus la mapojn de la tuta mondo. Ĉu mi trovos la saman volontulon?

Krystyna Szymanska, PL-59-300 Lubin, ul.  
Pawia 30/2, Polio.

\*\*\*\*\*

Geedzoj Marina (31 j. pentristino) kaj Anatolo (43 j. filologo) serĉas geamikojn ne nur por korespondado, sed ankaŭ por interŝanĝi vizitojn. Kolektas esperantaĵojn kaj interesiĝas pri moroj, kutimoj, vivmanieroj, ankaŭ pri historio kaj praktiko de naturismo.

Anatolo. Ivassenko,  
350000 Krasnodar, poŝte restante, Rusio.

\*\*\*\*\*

En 1992. esperantistoj povas senpage restadi en la Tendumejo Esperantista Sonnenheim. Tel: 441220, adreso:

CH-9424 Rheineck ĉe Bodanlago

\*\*\*\*\*

Hajnal MacGill, la ĵus alveninta filino de Stefan Macgill salutas la eksteran mondon kaj siajn geaptrojn!

\*\*\*\*\*

En la antaŭa numero de *EVENTOJ*, n-ro julio (1)-91, la titolpaĝa foto estas transprenita el la GEJ-gazeto.

## Recenzoj

Nova lernolibro

### Tendaraj tagoj - 2!

Aperis la dua kajero de la lernolibro por junuloj "Tendaraj tagoj". Ĝi daŭrigas la farojn, planojn kaj aventurojn de partoprenantoj en internacia esperanta tendaro. La du kajeroj liveras ĉirkaŭ tri kvaronojn de la esenca gramatiko de la lingvo - sufiĉa por komuniki kaj konversacii je internacia nivelo.

Stefano MacGill

### Tendaraj tagoj

Internacia Esperanta Tendaro por la Internacia Libro Komitato

— komitato por la Internacia Libro Komitato

— komitato por la Internacia Libro Komitato

— komitato por la Internacia Libro Komitato

— komitato por la Internacia Libro Komitato



— komitato por la Internacia Libro Komitato

La lernolibro estas pretigita laŭ la situacikomunika skolo, ne estas ligita al iu nacia lingvo, do uzeblas internacie, kaj estas destinita unuavice al lernantoj inter 10 kaj 14 jaraj.

Prezo ĉe UEA: 15 NLG kun triona rabato ekde tri ekz. Prezo ĉe ILEI: 45 svedaj kronoj. Prezo en Hungario: 140 forintoj (110 por kvantaj mendoj).

## Korespondi deziras

Viktoria Bolla, 17 jara lernantino dez. kor. ĉefe el Japanio, Hispanio kaj Svislando. Interesiĝas pri muziko, libroj, homoj. Adr: Bulcsu u. 9, H-2120 Dunakeszi, Hungario.

Csaba Helmle, Labanc u. 16/b, H-1021 Budapeŝt, Hungario, 15 jara lernanto, interesiĝante pri ĉio, serĉas korespondajn amikojn el Britio, Belgio, Francio Nederlando kaj Danio.

Eszter Makrai, Bajcsy-Zs. u. 14, H-2132 Göd, Hungario interesiĝas pri muziko, bestoj, desegnado, libroj, dancado volas kor. ĉefe al Aŭstralio, Hindio, Usono, Francio.

Marcela Nitu, 29 j. oficistino, str. Strudului, bl.6, ap. 21, R-2400 Sibiu, Rumanio.

Geedzoj Marina (31 j. pentristino) kaj Anatolo (43 j. filologo) serĉas geamikojn ne nur por korespondado, sed ankaŭ por interŝanĝi vizitojn. Kolektas esperantaĵojn kaj interesiĝas pri moroj, kutimoj, vivmanieroj, ankaŭ pri historio kaj praktiko de naturismo. A.

## Historio

### Kiam, kial kaj kiel mi lernis esperanton?

Mi lernis la lingvon dum la somero de 1912. Kun mia amiko, Ludoviko Györi Nagy mi promenis sur la ĉefstrato de Miskolc, kaj en montrofenestro ni ekvidis Esperanto-gramatikon. Mi jam ne memoras, kiu el ni proponis la ek-lernon, sufiĉe, ke ni tuj interkonsentis.

Kial? Se mi bone memoras, sole pro scivolo pri la strukturo de artefarita lingvo, do pro pure lingvistika interesiĝo. Post unumonata reciproka instruado diligenta ni jam komencis grandan konkurson pri poŝtmark-kolektado (kompreneble: poŝtmarko bildflanke). Ni ekkorespondis kun la tuta mondo. Kaj la konkurson gajnis - ne ni, sed tria persono, nia komuna amiko kaj instruato, al kiu ni liveris la korespondajn tekstoskemojn, kaj kiu - ĝis hodiaŭ ne lernis Esperanton. Mi senreviĝis pri la poŝtmark-kolektado, mi volis min nun perfektigi en la lingvo. Nu - plej bone oni lernas instruante: mi priparolis kun mia amiko kursogvidadon dum la somero de 1913. Nia neforgesebla Giesswein, laŭ niaj petoj, vojaĝis al Miskolc, faris propagandan paroladon, kaj ĝin sekvis nia kurso. Mi bone memoras, kiel ni iris kaleŝe de domoal



K. Kallós

Ivasenko, 350000 Krasnodar, poŝte restante, Rusio.

Ewlina Prazuch, Owczary 107, PL-28100 Busko-Zdroj, 20 jara fraŭlino dez. kor. kaj pretas je reciproka gastigado.

M. José Spada, Rua Siqueira Campos 3912, BR-15010 S.J. Rio Preto (SP), Brazilio dez. kor. kun diversaj landoj.

Sub la nomo de **KORESPONDI** ni kreis bultenon kaj servon por faciligi la korespondadon kaj ĉiajn amikajn rilatojn.

Korespondemuloj! Sendu vian anonceton por senpaga presigo en la bulteno **KORESPONDI**. Specimeno estas ricevebla kontraŭ 3 IRK (respondkuponoj) aŭ du dolaroj ĉe la eldonanto: R. Melo, 34 Avenue de Russie, F-03700 Bellerive s/Allier, Francio.

Yuriko Yamaguchi, 5-22-13 Doka Minamiku, Yokohama, Japanio volas korespondi kun vi, kaj ne nur kun vi.

Gilles Wallez, B.P. 1471 Abidjan, Cote d'Ivoire volas korespondi kun kvin kontinentoj.

domo por varbi publikon per persona persvado. Sed tiamaniere ni sukcesis kuntrumpeti vere rekordan publikon. La kurso estis la kutima kurso Esperanta: multaj komencantoj, multaj finantoj. Ĝi estis certe plej efika por mi mem, je la fino mi jam sentis min tute certa en la lingvo.

Kaj miaj lingvistikaj interesoj ne lasis min ripozi. Avide mi legis ĉion rilatantan al lingvaj problemoj, mi kritikis la lingvon, havis reformideojn, kaj fine mi bele atingis la blujajn bordojn de Ido. Mi lernis ĝin. Poste mi komencis fari verstradukojn, samtempe en Esperanto kaj Ido. Surprizis min la granda matureco, fleksebleco, elasteco, versebleco de Esperanto, dum Idon mi trovis nematura, rigida, seka tro artefarita. Ofte mi devis fari, kiel poezian permeson, deflankigon de la rigidaj Idaj derivreguloj, kaj per tio nevole reveni al Esperantaj formoj. Fine, kiam mi eksciis, ke mia Ido jam estas neekzistanta lingvo, ĉar dumtempe oni definitive fiksas Idon en sia formo, ol mi lernis ĝin el mia lernolibro, mi decidis ne lerni plu ĉi tiun novan formon kaj resti definitiva esperantisto. Poste venis la milito kaj Esperanto por mi tute eksilentis.

Ĝi eksilentis, dormis, sed ne mortis. En 1918, reveninte al Budapeŝt, mi tuj reaŭdis ĉian voĉon en mia animo. Kaj de tiam - sed tio ĉi jam ne apartenas al ĉi tiu temo.

Hungara Heroldo 1930,  
resp. Bulteno de HEK aprilo 1958.  
Kolomano Kalocsay.

### NE FORGESU!

Kongresejo: Aŭstria Centro Vieno,  
Am Hubertusdam 6,  
A-1220 Wien.

Telefono: (+43-222) 2323690.

### ESPERANTA SONKASEDO SEN P A G E !

Vidu la alvokon sur la suplementa paĝo!



# Aboneblo por la dua duonjaro!

Karaj legantoj,

ŝajne la decido startigi **EVENTOJ**-n ne jarkomence (kion kaŭzis eksteraj teknikaj cirkonstancoj) - havas siajn postsekvojn...

Laŭ la alvenintaj leteroj evidentas, ke la gazeton legas ne nur la abonintoj, sed ankaŭ iliaj konatoj, samklubanoj, ja ni ricevis multajn petojn kaj proponojn enkonduki aboneblon ankaŭ por la dua duonjaro "almenaŭ en la starta jaro".

Estis ja multaj, kiuj ne kredis reala la dusemajnan aperritmon, kaj decidis iom atendi por vidi la rezulton. Por ne elspezi por la malnovaj numeroj, la abono por nur la dua duonjaro ebligas al ili estonte (sed ankoraŭ ĉi-jare) regule ricevi kaj legi la gazeton.

Do, fimpensinte la aferon, ni decidis enkonduki tiun abontarifon, kiu validas inter la 1-a de julio kaj 31-a de decembro 1992. Abonkotizojn por la unuopaj landoj vi trovas en la apuda tabelo. Ni tre ĝojus, se pri tiu ebleco vi informus ankaŭ viajn konatojn, amikojn.

## Esperanta sonkasedo senpage!

Oni (=ni) faras la gazeton, por ke la esperantistoj legu ĝin. Konforme al nia originala celo, ni klopodas aperigi artikolojn, kiuj helpas al movade-nespertuloj orientiĝi en la eventoj de nia komunumo.

Por kreskigi la abonantaron plej efike povas helpi ĝuste la ĝisnunaj legantoj, kiuj plej bone konas la karakteron kaj fidindecon de nia gazeto. Do, se vi kolektos 5 novajn abonantojn al la dua duonjaro de 1992, por simbolo danki vian helpon ni proponas al Vi la muzikan sonkasedon de J. Dinnyés: **AL VENKO!**, kiu enhavas 16 esperantajn kantojn, inter ili la melodiigitajn verkojn de tiel famaj aŭtoroj kiel J. Baghy, R. Schwartzaŭ Zamenhof!

Por ricevi la kasedon vi simple kolektu la abonilojn, kune (!) sendu ĝin al ni, kaj respektive la abonkotizojn sendu kune al via kotizperanto!

Se vi estas kontenta pri la ĝisnunaj numeroj, ni dankas vian ĉi-rilatan helpon.

Kun samideanaj salutoj

Szilvási László



## Kiel aboni **EVENTOJ**-n?

1. Plenigu la abonilon, aŭ skribu leteron kun la sama enhavo, kaj sendu ĝin al la redakcio (LINGVO-Studio, H-1675 Budapeŝt, pk. 87. Hungario).

2. Pagu la abonkotizon al vialanda peranto listigitaj sube en la koncerna nacia valuto kaj sumo. (Se estas indikita dolaro anstataŭ vialanda valuto, tio signifas ke vi devas pagi la aktualan ekvivalenton de tiu sumo en via valuto).

3. La revuon vi ricevos rekte el Hungario perpoŝte.

## Kiel pagi?

- Sendu la kotizon al vialanda kotizperanto (perpoŝte aŭ poŝtĝirkonto) - en nacia valuto.

- Sendu la monon al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, kodo ELLS-S, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

- Sendu la monon rekte al la redakcio per simpla internacia poŝtmandato, aŭ perbanke al Banko OTP, Budapeŝt XVIII, Konto 218-98189/542-030808-7. Vi povas sendi ankaŭ euroĉekon. La valuto sur ĝi devas esti en ajna tipo de konvertebla valuto. Sur la dorsa flanko nepre skribu la numeron de via bankkarto!

- En fina kazo - je via risiko - sendu monbiletojn (en konvertebla valuto inkluzive forintojn) en fermita koverto al la redakcio.

## Landaj kotizperantoj

**Aŭstrio:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, A-3400 Klosterneuburg (pĉk. 7.127.144).

**Belgio:** Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen (pĝk. 000-0265338-43).

**Brazilio:** Brazila Esperanto Ligo, Carlos Maria, Cx. Postal 03625, Brasilia-DF, 70084.

**Britio:** Paul Hewitt, 26 Higfield Rd, North Thoresby, Grimsby, S. Humbs, DN36 5RT.

**Ĉeĥoslovakio:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Vladimír Dvorak, Jilská 10, CS-110 00 Praha-1.

**Danio:** Eckhard Bick, Rugbjergvej 98, DK-8260 Viby-J. (Poŝtĝirnumero: 696 47 37)

**Francio:** UFE, 4. bis, rue de la Ceresaie, F-75004 Paris (pĉk. 855-35 D Paris).

**Germanio:** Monda Merkato, Alfred Schubert, Pf. 1539, DW-8120 Weilheim, (konto 365255-806, postgiroamt München, BLZ 700 100 80).

**Hungario:** LINGVO-Studio, H-1675 Budapeŝt, pk. 87.

**Hispanio:** Juan Azcuénaga Vierna, General Dávila 127, p.7, 2ª izda, E-39007 Santander (Cantabria) Bankkonto ĉe Caja Postal n-ro 03548531 (O.P.)

**Israelo:** Aviv Faklieru, Pk. 8383, IL-61083 Tel-Aviv, (konto 403679, Bank Mizrahi, Faklieru Esperanto).

**Italio:** Itala Esperanto-Federacio, villa Villoresi 38, I-20143 Milano (pĉk. 37312204).

**Japanio:** Rondo Harmonia, Yamaguti Sin'iti, Tutihara 3-205, Tenpaku-ku, Nagoya-si, 468 Japanio.

**Korea Respubliko:** Seula Esperanto-Kulturcentro, Lee Jung-kee, 100-630 C.P.O. Box 3047, Seoul.

**Kroatio:** Kroatia Esperantista Unuiĝo, Marija Beloŝević, Trg burze 2, 41000 Zagreb.

**Norvegio:** Esperantoforlaget, Olaf Schous vei 18, N-0572 Oslo, poŝtĝirokonto 0809 5100318.

**Polio:** P.W.H. NEPO, skrytka 105, Maciej Wnuk, ul. Broniewskiego 77. m. 137, PL-01865 Warszawa.

**Portugaliao:** Libroservo de Portugalia Esperanto-Asocio, Antonio Martinus, Rua rd. Joao Conto 6, R/C-A, P-1500 Lisboa.

**Sud-Afriko:** Colin Beckford, P.O. Box 1227, Cape Town, 8000.

**Svedio:** Sveda Esperanto Federacio, SEF, c/o Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-242 94 Hörby.

**Svislando:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen.

**Venezuelo:** Prof. J. E. Bachrich, Apartado 70782, Caracas 1071 A.

Esperantistoj el eksa Sovetunio, Rumanio kaj Bulgario ĉi-jare ankoraŭ povas aboni la gazeton kontraŭ 10 dolaroj.

## Kotizoj por 01.07.-31.12.1992 .

		Eventoj surface	Eventoj aere
Aŭstrio	ATS	177	+30
Belgio	BEF	550	+75
Brazilio	USD	—	10
Britio	GBP	9	+2
Ĉeĥoslovakio	KCS	170	—
Danio	DKK	100	+20
Francio	FRF	90	+15
Germanio	DEM	27	—
Hungario	HUF	470	—
Hispanio	ESP	1800	+300
Israelo	USD	9	+2
Italio	ITL	18000	+3000
Japanio	JPY	2400	+300
Korea Resp.	USD	—	10
Kroatio	USD	9	—
Norvegio	NOK	100	+20
Polio	PLZ	90000	+15000
Portugaliao	PTE	2200	+300
Sud-Afriko	ZAR	40	+10
Svedio	SEK	100	+13
Svislando	CHF	24	+3
Venezuelo	USD	8	+2
ĉiuj aliaj landoj	NLG	30	+4

sendu al: **EVENTOJ**, H-1675 Budapeŝt, pk. 87. Hungario

## ABONILO

Jes, mi abonas la gazeton **EVENTOJ** por la dua duonjaro de 1992!

Nomo de la abonanto: .....

Preciza poŝta adreso: .....

..... poŝta kodo: .....

La abonprezon de ..... (sumo) mi pagis al: .....

Dato: ..... Subskribo: .....

# Aboneblo por la dua duonjaro!

Karaj legantoj,

ŝajne la decido startigi EVENTOJ-n ne jarkomence (kion kaŭzis eksteraj teknikaj cirkonstancoj) - havas siajn postsekvojn...

Laŭ la alvenintaj leteroj evidentas, ke la gazeton legas ne nur la abonintoj, sed ankaŭ iliaj konatoj, samklubanoj, ja ni ricevis multajn petojn kaj proponojn enkonduki aboneblon ankaŭ por la dua duonjaro "almenaŭ en la starta jaro".

Estis ja multaj, kiuj ne kredis reala la dusemajnan aperritmon, kaj decidis iom atendi por vidi la rezulton. Por ne elspezi por la malnovaj numeroj, la abono por nur la dua duonjaro ebligas al ili estonte (sed ankoraŭ ĉi-jare) regule ricevi kaj legi la gazeton.

Do, ŝinpensinte la aferon, ni decidis enkonduki tiun abontarifon, kiu validas inter la 1-a de julio kaj 31-a de decembro 1992. Abonkotizojn por la unuopaj landoj vi trovas en la apuda tabelo. Ni tre ĝojus, se pri tiu ebleco vi informus ankaŭ viajn konatojn, amikojn.

## Esperanta sonkasedo senpage!

Oni (=ni) faras la gazeton, por ke la esperantistoj legu ĝin. Konforme al nia originala celo, ni klopodas aperigi artikolojn, kiuj helpas al movade-nespertuloj orientiĝi en la eventoj de nia komunumo.

Por kreskigi la abonantaron plej efike povas helpi ĝuste la ĝisnunaj legantoj, kiuj plej bone konas la karakteron kaj fideindecon de nia gazeto. Do, se vi kolektos 5 novajn abonantojn al la dua duonjaro de 1992, por simbole danki vian helpon ni proponas al Vi la muzikan sonkasedon de J. Dinnyés: **AL VENKO!**, kiu enhavas 16 esperantajjn kantojn, inter ili la melodiigitajn verkojn de tiel famaj aŭtoroj kiel J. Baghy, R. Schwartzaŭ Zamenhof!

Por ricevi la kasedon vi simple kolektu la abonilojn, kune (!) sendu ĝin al ni, kaj respektive la abonkotizojn sendu kune al via kotizperanto!

Se vi estas kontenta pri la ĝisnunaj numeroj, ni dankas vian ĉi-rilatan helpon.

Kun samideanaj salutoj

Szilváni László



## Kiel aboni EVENTOJ-n?

1. Plenigu la abonilon, aŭ skribu leteron kun la sama enhavo, kaj sendu ĝin al la redakcio (LINGVO-Studio, H-1675 Budapeŝt, pk. 87. Hungario).

2. Pagu la abonkotizon al vialanda peranto listigitaj sube en la koncerna nacia valuto kaj sumo. (Se estas indikita dolaro anstataŭ vialanda valuto, tio signifas ke vi devas pagi la aktualan ekvivalenton de tiu sumo en via valuto).

3. La revuon vi ricevos rekte el Hungario perpoŝte.

## Kiel pagi?

- Sendu la kotizon al vialanda kotizperanto (perpoŝte aŭ poŝtĝirkonto) - en nacia valuto.

- Sendu la monon al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, kodo ELLS-S, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

- Sendu la monon rekte al la redakcio per simpla internacia poŝtmandato, aŭ perbanke al Banko OTP, Budapeŝt XVIII, Konto 218-98189/542-030808-7. Vi povas sendi ankaŭ euroĉekon. La valuto sur ĝi devas esti en ajna tipo de konvertebla valuto. Sur la dorsa flanko nepre skribu la numeron de via bankkarto!

- En fina kazo - je via risiko - sendu monbiletojn (en konvertebla valuto inkluzive forintojn) en fermita koverto al la redakcio.

## Landaj kotizperantoj

**Aŭstrio:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, A-3400 Klosterneuburg (pĉk. 7.127.144).

**Belgio:** Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijk-lei 140, B-2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43).

**Brazilio:** Brazila Esperanto Ligo, Carlos Maria, Cx. Postal 03625, Brasilia-DF, 70084.

**Britio:** Paul Hewitt, 26 Higfield Rd, North Thoresby, Grimsby, S. Humbs, DN36 5RT.

**Ĉeĥoslovakio:** Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Vladimír Dvorak, Jiřska 10, CS-110 00 Praha-1.

**Danio:** Eckhard Bick, Rugbjergvej 98, DK-8260 Viby-J. (Poŝtĝirnumero: 696 47 37)

**Francio:** UFE, 4. bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk. 855-35 D Paris).

**Germanio:** Monda Merkato, Alfred Schubert, Pf. 1539, DW-8120 Weilheim, (konto 365255-806, postgiroamt München, BLZ 700 100 80).

**Hungario:** LINGVO-Studio, H-1675 Budapeŝt, pk. 87.

**Hispanio:** Juan Azcuénaga Vierna, General Dávila 127, p.7, 2ª izda, E-39007 Santander (Cantabria) Bankkonto ĉe Caja Postal n-ro 03548531 (O.P.)

**Israelo:** Aviv Faklieru, Pk. 8383, IL-61083 Tel-Aviv, (konto 403679, Bank Mizrahi, Faklieru Esperanto).

**Italio:** Itala Esperanto-Federacio, villa Villaresi 38, I-20143 Milano (pĉk. 37312204).

**Japanio:** Rondo Harmonia, Yamaguti Sin'iti, Tutihara 3-205, Tenpaku-ku, Nagoya-si, 468 Japanio.

**Korea Respubliko:** Seula Esperanto-Kulturcentro, Lee Jung-kee, 100-630 C.P.O. Box 3047, Seoul.

**Kroatio:** Kroatia Esperantista Unuiĝo, Marija Beloŝeviĉ, Trg burze 2, 41000 Zagreb.

**Norvegio:** Esperantoforlaget, Olaf Schous vei 18, N-0572 Oslo, poŝtĝirokonto 0809 5100318.

**Polio:** P.W.H. NEPO, skrytka 105, Maciej Wnuk, ul. Broniewskiego 77. m. 137, PL-01865 Warszawa.

**Portugalia:** Libroservo de Portugala Esperanto-Asocio, Antonio Martinus, Rua rd. Joao Conto 6, R/C-A, P-1500 Lisboa.

**Sud-Afriko:** Colin Beckford, P.O. Box 1227, Cape Town, 8000.

**Svedio:** Sveda Esperanto Federacio, SEF, c/o Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-242 94 Hörby.

**Svislando:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen.

**Venezuelo:** Prof. J. E. Bachrich, Apartado 70782, Caracas 1071 A.

Esperantistoj el eksa Sovetunio, Rumanio kaj Bulgario ĉi-jare ankoraŭ povas aboni la gazeton kontraŭ 10 dolaroj.

## Kotizoj por 01.07.-31.12.1992 .

		Eventoj surface	Eventoj aere
Aŭstrio	ATS	177	+30
Belgio	BEF	550	+75
Brazilio	USD	—	10
Britio	GBP	9	+2
Ĉeĥoslovakio	KCS	170	—
Danio	DKK	100	+20
Francio	FRF	90	+15
Germanio	DEM	27	—
Hungario	HUF	470	—
Hispanio	ESP	1800	+300
Israelo	USD	9	+2
Italio	ITL	18000	+3000
Japanio	JPY	2400	+300
Korea Resp.	USD	—	10
Kroatio	USD	9	—
Norvegio	NOK	100	+20
Polio	PLZ	90000	+15000
Portugalia	PTE	2200	+300
Sud-Afriko	ZAR	40	+10
Svedio	SEK	100	+13
Svislando	CHF	24	+3
Venezuelo	USD	8	+2
ĉiuj aliaj landoj	NLG	30	+4

sendu al: EVENTOJ, H-1675 Budapeŝt, pk. 87. Hungario

## ABONILO

Jes, mi abonas la gazeton **EVENTOJ** por la dua duonjaro de 1992!

Nomo de la abonanto: .....

Preciza poŝta adreso: .....

..... poŝta kodo: .....

La abonprezon de ..... (sumo) mi pagis al: .....

Dato: ..... Subskribo: .....